FN PER ANC 47

ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO
.unuiĝo de la normandaj esperantistoj
n°165 TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:

AŬGUSTO - 1989A - (SOMERO 1989A - N° 80A NOVA SERIO).

## Nian Ĝeneralan Kunvenon Partoprenu

## YVETOT :: la 8an de oktobro ::

Karaj legantoj,

Pro tio ke la ferioj tro frue finiĝis, mi nur dum kelkaj horoj partoprenis la Universalan Kongreson de U. E. A. kiu ĉi-jare okazis en Brajtono (Anglujo). Tie renkontiĝis pli ol du mil samideanoj de pluraj dekoj da landoj. La valizoj ankoraŭ staris en la halo de la kongresejo kie la plej malnovaj esperantistoj babiladis kun freŝbakitaj fervorantoj. Venintaj de la plej diversaj landoj, kulturoj, medioj, ili jam rekreis tiun ĉiu-jaran vilaĝon kies ĉiu loĝanto konscias pri terglobo, bieno de ĉiu homo flava, ruĝa, blanka aŭ nigra.

Tutcerte tiuj manifestacioj imponaj varbas por la tuta movado. Ni kiel eble plej ofte kaptu la okazon por ilin partopreni. Mi esperas ankoraŭ ke tiuj kongresanoj, kiam ili revenos hejmen, daŭre laboros por ke nia komuna afero prosperu. Tiam lokaj kaj regionaj asocioj iĝas gravaj. Propagando kaj kursoj por esperanto kelkfoje lacigas la plej fervorajn se ne ekzistas strukturo por subteni iliajn agojn, por kuraĝigi la komencantojn, kiuj tre rapide bezonas certigon pri konkreta ekzisto de la movado.

Tre bonŝance Normandio havas regionan asocion kiu de multaj jaroj ebligas kontaktojn inter ĉiuj grupoj kaj individuoj. La bulteno, eĉ modesta, kaj la Ĝenerala kunveno grandan rolon ludas en ĝia vivo.

Ju pli multaj ni estos en la Ĝenerala Kunveno de U. N. E. okazonta en Yvetot la 8an de Oktobro 89, despli vigliĝos nia regiona movado.

TUJ !!! sendu vian aliĝilon al P. Pottier por konfirmi vian partoprenon. Multe dankon.

# 89 / 10 / 8 an ....totevy (hi hi, ih ih)



En Yvetot, la grupo ĉiujare organizas festeton, kiu kutime estas Reĝkuka Festo, aŭ komuna manĝo.

Ĉi-jare okazos komuna tagmanĝo en "Salle du Vieux Moulin", rue de l'Etang, Dimanĉon, la 8an de Oktobro 1989, je la 12a horo. Ĉiuj Normandaj Esperantistoj estos bonvenaj. Prezo : 75 F.

Post tiu manĝo, okazos en la sama loko, je la 14h30, la ĜENERALA KUNVENO de nia asocio. Do, rezervu tiun daton kaj nepre ĉeestu, eĉ se vi ne deziras partopreni la manĝon. Por ne forgesi, tuj resendu la ĉi-kunan aliĝilon al S-ro Pierre Pottier; 25 Allée des Roitelets 76 190 Yvetot. Tel. 35 95 14 69

Antaŭan dankon !

---

## ALIĜILO

**resendota al s-ro Pottier antaŭ la 15a de oktobro**


NOMO :

ADRESO :

TELEFONO

:-:-:-:-:

+ ☐ Mi partoprenos la Ĝeneralan Kunvenon de U. N. E.
☐ Mi venos sola
☐ Ni estos entute .... personoj
☐ Ni partoprenos la komunan manĝon
☐ Ni ne partoprenos la komunan manĝon
☐ Mi pagas la sumon de ..... frankoj per
  mandato ☐
  bankĉeko ☐
  poŝtĉeko ☐



+ Bonvolu signi per kruceto la utilajn frazojn.

Subskribo :

Ĉu vi pagis vian 1989-kotizon?

La unua listo de tiuj kiuj pagis sian abonkotizon antaŭ la 10a de aprilo aperis en la bulteno No 164. NUN,jen la 2a listo por la periodo inter la 10a de Aprilo kaj la 21a de Julio.:

Gesinjoroj:CASAMAYOR el Le Havre,LEMAZURIER,HAULARD,LEHERICEY,el Vire,ROBLIN el Rouen,GIRAUD el Forges les Eaux,JOURDAINE el Neuville Chant d'Oisel, LANGLOIS el Le Havre,TAILPIED el Hennequeville,L'HERMITTE el Sotteville.

Ni memorigas ke la novaj gelernantoj ricevas la bultenon senpage dum la unua jaro.

La kotizo 1989 estas 45 Frankoj.

Skribu vian ĉekon je ordo de:UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE
C C P 283 40 H ROUEN

Sendu vian ĉekon poŝtan rekte al via CCP centro

Sendu vian bankĉekon al la kasisto de UNE: Pierre QUILLAUD
16,rue Lt Vaisseau Paris
76120 Le GRAND QUEVILLY






## 20 000 LECONS GRATUITES D'ESPERANTO

Suite au succès du cours express d'espéranto diffusé en août 1988 par France Inter, avec le concours de SAT-Amikaro, et auquel plus de 5000 auditeurs ont réagi favorablement par téléphone et par courrier, cette même association offre cette année la correction gratuite de 20 000 leçons d'initiation à l'espéranto.

Cette première leçon est proposée dans une brochure donnant des informations utiles sur les problèmes de communication linguistique mondiale et sur l'espéranto : raison d'être, aperçu historique, aspects socio-culturels et linguistiques, applications pratiques, enseignement dans le monde, possibilités d'apprentissage, etc. La brochure peut être obtenue sans engagement contre 1 F + participation aux frais d'envoi (un timbre au tarif en vigueur pour 20 g) chez SAT-Amikaro, 67, avenue Gambetta, 75020 Paris .

LE HAVRE

# nia vivo en ...

Somero havigas al gesamideanoj okazon ĉeesti internaciajn renkontiĝojn. Kelkaj klubanoj antaŭvidas partopreni la Universalan Kongreson en Brighton (Brajtono). Tamen Esperantujo estas trafebla eĉ en nia lando: la 4an de Julio, bicikla esperantista karavano atingis nian urbon. Por gastigi tiun sporteman teamon venis kelkaj klubanoj. BEMI estis oficiale akceptita de Havra helpurbestrino Tiu evento estis eĥoita en la loka gazetaro

Pasintan bultenon, ni anoncis atenditan viziton de niaj britaj gesamideanoj el Southampton. Ĝi okazis fine de majo, agrabla vetero helpis al sukceso de nia internacia semajnfino. Programeroj ebligis al niaj amikoj retrovi korespondantojn. Dimanĉe, ni vizitis najbaran urbeton Harfleur kaj ties priorejon.

Komence de junio, dank'al klopokoj de amikino N. Peltier ekspozicio estis starigita en Havra Pedagogia Dokumentejo. Alloga dokumentaro montris al la vizitintoj uzeblecon de internacia lingvo Esperanto en lerneja, turisma aŭ gazeta medioj.

S. Caron



rouen

La Rûena Grupo dormas kaj eĉ dormegas!!! De kiam Pierre LEMARchand translokiĝis en Hautôt sur Seine, la grupo estas senmotora kaj ne plu kunvenas. Annie GAILLARD akceptis provizore prezidi la grupon sed ne disponas tempon por aktivigi la membrojn. Petro KIJO estas kasisto de Groupe Espéranto Région Rouennaise (GERR) sed kompreneble li ne plu ricevas kotizojn por tiu fantoma grupo.Krome P.KIJO estas ankaù kasisto de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj (U.N.E.) kaj peranto de S.A.T. kaj li gvidas ĉiuĵaùdc 2 kursojn en Laika Amikaro de Le Grand Quevilly;li instruas 11 gelernantojn.

Merkrede 5an de Julio,tiuj gelernantoj kunvenis antaù urbodomo de Rouen por akcepti biciklan karavanon gvidatan de Jorgos.Fakte la karavano konsistis nur el 4 biciklantoj!Feliĉe,pro la nombro de simpatiantoj, la kunveno ne aspektis tro mizera.Urbkonsilanto akceptis nin kaj ĵurnalisto de PARIS-NORMANDIE FOTIS LA GRUPON KAJ VERKIS ARTIKOLETON.Por la propagando,tiu evento estis do pozitiva.

**vire**

Kiel kutime la grupo afable akceptis la biciklan grupon kiu ĉi-jare estis pli ampleksa : kvin biciklantoj akompanis Jorgos, inter ili : 1 Kanadano, 1 usonanino.

"La Manche Libre" raportis pri la evento, iom malfavore : "Pourtant, si cette langue permet de communiquer facilement, elle n'est commune à aucun groupe social et ne repose sur aucun héritage linguistique....Voilà pourquoi elle reste avant tout une langue artificielle et donc peu usitée...".

**herouville**

Alvenis 2 Hungaroj kiuj vojaĝis tra la tuta lando pere de "Pasporta Servo". Ili restadis dum 3 tagoj, sin banis en nia maro, admiris Saint Michel monton, vizitis la urbon Caen.



ESPERANTO - EUROPE DE DEMAIN et

MINISTERE FRANCAIS DE L'EDUCATION NATIONALE

Le Conseiller de M.Lionel Jospin ,ministre de l'éducation nationale,a accordé une audience à une délégation du mouvement espérantiste composée de MM Jacques FILLEUL,Pierre JANTON,et Léo MIQUEL.

Le compte-rendu de cette audience figure dans ESPERANTO ACTUALITES ,revue française d'Espéranto éditée par U.F.E. (4 bis rue de la Cerisaie Paris)

Nous engageons vivement nos adhérents à se procurer ce document et à s'en délecter.

Le manque de place nous empêche de le reproduire dans notre bulletin.Nous nous contenterons d'extraire cette déclaration du conseiller.

"Les textes (établis en accord avec nos partenaires européens) sont formels:on ne peut enseigner en France que des langues nationales s'appuyant sur une culture.L'Espéranto ne présente aucune de ces caractéristiques."

Tous les arguments de la délégation espérantiste furent vains.

Quant au rappel du projet de loi visant à introduire l'Espéranto comme langue à option dans les Lycées et Collèges et signé de noms aujourd'hui illustres (MM .Mitterrand,Rocard,Mauroy, etc...),réponse du Conseiller:

"Voyez sa date:1979.Passé alors devant la Conférence des Présidents qui ne l'a pas retenu,il est donc depuis longtemps caduc".

Mais bien sur! Que les espérantistes sont donc naifs!
Ily a des pays où l'Espéranto fut interdit et ses adeptes persécutés(lire le livre "La Danĝera Lingvo")Si le résultat était le même,au moins,c'était moins hypocrite.!!!

Petro KIJO

**vire**

Kiel kutime la grupo afable akceptis la biciklan grupon kiu ĉi-jare estis pli ampleksa : kvin biciklantoj akompanis Jorgos, inter ili : 1 Kanadano, 1 usonanino.

"La Manche Libre" raportis pri la evento, iom malfavore : "Pourtant, si cette langue permet de communiquer facilement, elle n'est commune à aucun groupe social et ne repose sur aucun héritage linguistique....Voilà pourquoi elle reste avant tout une langue artificielle et donc peu usitée...".

**herouville**

Alvenis 2 Hungaroj kiuj vojaĝis tra la tuta lando pere de "Pasporta Servo". Ili restadis dum 3 tagoj, sin banis en nia maro, admiris Saint Michel monton, vizitis la urbon Caen.



## ESPERANTO - EUROPE DE DEMAIN et MINISTERE FRANCAIS DE L'EDUCATION NATIONALE

Le Conseiller de M.Lionel Jospin ,ministre de l'éducation nationale,a accordé une audience à une délégation du mouvement espérantiste composée de MM Jacques FILLEUL,Pierre JANTON,et Léo MIQUEL.

Le compte-rendu de cette audience figure dans ESPERANTO ACTUALITES ,revue française d'Espéranto éditée par U.F.E. (4 bis rue de la Cerisaie Paris)

Nous engageons vivement nos adhérents à se procurer ce document et à s'en délecter.

Le manque de place nous empêche de le reproduire dans notre bulletin.Nous nous contenterons d'extraire cette déclaration du conseiller.

"Les textes (établis en accord avec nos partenaires européens) sont formels:on ne peut enseigner en France que des langues nationales s'appuyant sur une culture.L'Espéranto ne présente aucune de ces caractéristiques."

Tous les arguments de la délégation espérantiste furent vains.


Quant au rappel du projet de loi visant à introduire l'Espéranto comme langue à option dans les Lycées et Collèges et signé de noms aujourd'hui illustres (MM .Mitterrand,Rocard,Mauroy, etc...),réponse du Conseiller:

"Voyez sa date:1979.Passé alors devant la Conférence des Présidents qui ne l'a pas retenu,il est donc depuis longtemps caduc".

Mais bien sur! Que les espérantistes sont donc naifs!
Ily a des pays où l'Espéranto fut interdit et ses adeptes persécutés(lire le livre "La Danĝera Lingvo")Si le résultat était le même,au moins,c'était moins hypocrite.!!!

Petro KIJO

# GISORS



Tempe de la Gaŭloj, unu el la fortresoj, kie la kelta civilizo rifuĝis ; sub la Romianoj, strategia pozicio de la valo de Sejno izolita, tuttaŭga por kontroli la apudan arbaroplenan regionon. Mezepoke, ĉar samdistanca al Parizo kaj Rouen, alirvojo al la potencaj episkopejoj de Pikardio kaj Campanjo (tie la sorto de la reĝoj decidiĝis) : jen Gisors.

Oni diris, ke la kastelo ilustras astronomiajn kaj astrologiajn leĝojn (fakte la plano prezentas la pozicion de la steloj kaj suno sur la ĉielo tiaj, kiaj la 23-an de decembro 1090). Kaj tiun konstaton oni rilatigis kun la templanoj. Tamen fine de la XI-a jarcento, kiam la konstrulaboroj komenciĝis, la templ-ordeno ankoraŭ ne ekzistis kaj ĝi okupis la kastelon nur en 1148 kaj tie restis nur tri jarojn.

Fine de la XII-a jarcento Henriko Plantagenet ordonis taŭgarangôjn en Gisors. Sub la fama ulmo antaŭ la preĝejo Sankta Gervaso staranta kunvenis la supre-menciita Henriko, Filipo-Aŭgusto kaj Gulielmo el Tyr, la ĉefepiskopo, kiu predikis la trian krucmiliton. Legendo raportas, ke pro mishumoro de ambaŭ reĝoj la Francoj dehakis la arbon, kiu -iliaopinie- konsistigis gravan simbolon por la Angloj. Filipo-Aŭgusto konstruigis la "turo(n) de l' enkarcerigito".

Antaŭe normanda, Gisors estos franca ĝisfine de la centjara milito. En 1419 Henriko la kvina el Anglujo perforte okupas la fortreson, sed ekde la dua duono de la XV-a jarcento paco regas kaj oni povas rekonstrui la tre difektitan preĝejon.

Dum la religiaj militoj Gisors daŭre estas katolika loko. De la revolucia epoko la graveco de la urbo malpliiĝas.

La ĉefturo, mirinda observejo, tiras la okulon. Ankaŭ notindas subtera pasejo, longa koridoro de la ĉefturo al la paroĥa preĝejo. (Probable ĝi estis uzata por venigi la provianton necesan al la kastel-enloĝantoj). Aliaj subteraj lokoj, apude, kun grandaj niĉoj. Ekzistis kapelo, ne sub la ĉefturo, sed sub la paroĥa preĝejo -tamen tute senrilata kun la templanoj, ĉar ili malaperis en 1312 dum ĝi datumas de la jaro 1530. Povas esti, ke dum la XVI-a jarcento oni tie transportis kaj kaŝis objektojn kaj dokumentojn de la templ-ordeno devenintajn, kiuj antaŭe estintus aliloke garditaj. Laŭ tiu hipotezo oni ilin metintus en tiun kapelon Sankta Katarina, ĉar ili povus esti taksataj kompromitaj por la eklezio -do pli bone ilin gardi en sekura loko.

Historiistoj raportis pri kofroj en kripto enfermitaj. Tiel supozindas, ke la templanoj, sekrete sciigitaj pri la pereiga dato, havintus la tempon ŝirmi siajn sekretojn kaj trezoron. Ĉaroj elirintus el Parizo en direkto al Gisors por ĉion ĉi tion kaŝi en kripto nur de la koncernatoj konata. Tamen pli verŝajne supozindas, ke tia trezoro estintus prefere veturigata al Anglujo, tiuokaze Gisors estus nur la unua etapo. Sed kial, eĉ per cemento, oni obstine reŝtopis la fositajn subterajn lokojn ? Mistero ŝvebas.

Menciindas alia tezo, ne sur probablecoj, sed sur multe-nombraj dokumentoj baziĝanta. La kripto Sankta Katarina (la nura, kies ekzisto estas eksterduba) ricevintus kofrojn plenajn je dokumentoj, ne el la templ-ordeno, sed el mistera Siono-priorejo, fondita de Godfredo el Bouillon (do antaŭ la fondiĝo de la templ-ordeno). Ambaŭ fondaĵoj, sekrete kunligitaj, disiĝintus en 1188 -momente de la supre-dirita ulmo-dehako. La Priorejo paralele supervivintus ĝis nia epoko kaj kelkaj templaj dokumentoj estintus kunkaŝitaj.

Sed dubinda estas la aŭtenteco de la dokumentoj ; kaj krom ili, neniu verko pri la kavaliraj ordenoj aludas tiun priorejon. Estis dirite, ke Godfredo el Bouillon probable havis kontaktojn kun la gnostikula frataro. La Siono-priorejo estus disetendiĝinta el Jerusalemo ĝis la tempo, kiam ties regantoj komprenis, ke ili bezonas organizaĵon ~~el~~- en la ĉiutaga vivo integriĝantan. Tiucele estus fondita la unua grupo de la templanoj, ekzotera milico en la mondon sendota, sed sub la aŭtoritato de la ĉiondecidanta priorejo. Ĉi lasta estus kulpiginta la templanojn pro la perdo de Jerusalemo kaj hontinda malvenko ; la fama dehakita ulmo estus la emblemo de la apartiĝo. Tial neniu defenda voĉo sonis dum la proceso de Jacques de Molay kaj templaj altranguloj.

Pri la ulmo, mi aldonu, ke tutsimila arbofrato staris en Parizo, ĝuste antaŭ la preĝejo Sankta Ĝervaso, proksime al la templa ĉirkaŭbaritejo.

Tiajn tiklajn misterojn en fascinaj lokoj entenatajn nia nacia televido antaŭ nelonge revivigis subforme de pasiiga felietono. Ĉu iam sin levos la vualo ?

**s. boniol**

Groupe d'Action pour l'Esperanto
123, Rue de Royan
16710 SAINT-YRIEIX - Tél. 45 95 41 82
Association Loi de 1901

# LA POSTE

Ayant constaté que de nombreux membres du personnel des POSTES et TELECOMMUNICATIONS ignorent la place qu'occupe la langue internationale dans le monde et, plus particulièrement, au sein de l'Administration des P.T.T.; (ignorant même l'existence de l'Association "ESPERANTO P.T.T."), le G.A.E. lance une campagne publicitaire spécifique dans ce domaine et recommande à ses participants et correspondants de distribuer le plus largement possible le prospectus ci-joint à tous les Agents des Postes et Télécommunications de leur département.

Ce prospectus, réalisé aux couleurs de la POSTE (jaune et bleu), devrait retenir l'attention des membres du personnel de l'Administration et nous valoir de nombreuses demandes de renseignements que nous communiquerons

- à l'Association "ESPERANTO P.T.T." (Sro COLNEY)
- aux association espérantistes des départements distributeurs du prospectus.

Cette action publicitaire, très importante, n'entraîne pas des dépenses considérables, compte tenu de l'impact qu'elle peut avoir sur le personnel des P.T.T. et sur le public en contact avec lui.

Le coût de ces prospectus est de 350 Frs le mille + frais d'envoi à raison de 5 Kgs,100 brut pour mille (majoration de 0,05 par unité pour quantités inférieures à mille).

ANTAŬEN !

# Pasporta Servo




## L'AMIKECA RETO

gérard Rollin

63, rue de la république

Chargé -37530 Amboise

184 membroj en 29 landoj
por vojaĝi, korespondi,
diskuti pri la plej diversaj temoj.
1 n-ro : 30 F. 3 n-ro : 60 F.
Rollin CCP La Source 1544 95 V

Jen la dek-sesa PS ! 904 gastigantoj en 53 landoj atendas vian viziton !

Distribuas : Christian NIETSCHE, Wehrstr. 69 C3,
D-4200 Oberhausen
FR Germanio
Konto : 393556-434
Poŝtĝiroficejo Essen
Prezo : 6 germanaj markoj.



"ESPERANTO - NORMANDA BULTENO"
de L'Union des Espérantistes de Normandie

Minimuma Kotizo por 1989 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN
Sendu vian poŝtĉekon rekte al via CCP Centro
bankĉekon al : Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly

Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel 31 95 11 81